13-a JARO, N-o 447 — MONATA ESPERANTO-GAZETO — 25. NOVEMBRO 1936

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO, ADMINISTREJO K SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO : 67, avenue Gambetta, Paris-20

Poŝtĉekaj kontoj je nomo de SAT-Paris : Bruxelles n-o 350 189, S'Gravenhage n-o 211 533 Kopenhago n-o 4 986, Paris n-o 1234 22, Stokholmo n-o 74 153, Wien n-o D-109 068, Zagreb n-o 41 448, Zürich n-o VIII-200 49. Alilande oni pagu per poŝtmandato je nomo de SAT., bonvalutaj devizoj en rekom. letero aŭ bankĉeko je nomo de « Bannier ».

La Administracio de SAT pri la problemo de la devaluo (1)

Kiel vi ĉiuj scias, la devaluo de l'respektivaj monvaloroj okazis antaŭ kelka tempo en kvin landoj, inter kiuj troviĝas du, kie SAT havas la plimulton el sia membraro k klientaro, nome Francio k Nederlando.

Tia ekonomia evento ne povas resti seninflua sur nian entreprenon, kies agadkampo estas tipe tutmonda. Imagu la perturbon, kiun kreas la devaluo en firmo, — francia, nederlanda aŭ svisia, — kies komerco estas esence internacia. Ne ĉiuj establoj, el tia speco, kapablos rezisti al la skuego ; multaj ŝanceliĝos, aŭ longtempe vegetos.

Ĉu do troviĝos inter ĉi lastaj ankaŭ nia « firmo », sub la frapo de la ekonomileĝa uragano? Ne, ni ne mortbaton suferos. Male, ĝuste dank' al nia tutmondeca karaktero, ni atendas, post ioma tempo, signojn de nova prospero.

Kiel do tio povas okazi, ĉar ja ni jam komunikis lastnumere, ke ni ŝanĝas nek la prezojn fiksitajn en francaj frankoj, de niaj varoj, nek la tarifon de kotizoj k abonoj por la devaluitaj landoj? (Eĉ tiu de Nederlando prezentiĝas valute k **nominale** iom pli favore, kompare kun la antaŭaj jaroj, ĉar tie ni rajtas atendi por 1937 proporcian kreskon de la membraro!).

Nu, simple pro tio ke, laŭ nia konjekto, la malpliiĝo, en orvaluto, de niaj enspezoj en la devaluitaj landoj estos larĝe kompensata per altiĝo — ne laŭ ora, sed laŭvaluta! — de niaj enspezoj (transformitaj en fr. fr.) en landoj, kies valuto ne ŝanĝiĝis.

Por la SAT-anoj k klientoj en Britio, Usono, Skandinavio kc., la devaluo de l'franko signifas, ke de nun ili elspezos 1/3 malpli por aĉeti niajn librojn k « Plena Vortaro »n. Konsekvence ni esperas, ke akceliĝos tie la vendado de la SAT-varoj k do, ke altiĝos la vendocifero. Dume ne ekzistas motivo por niaj membroj en la devaluitaj landoj ĉesigi aŭ bremsi la aĉeton de niaj eldonaĵoj, ĉar ja ne ŝanĝiĝis la rilato inter ilia salajro k niaj prezoj.

***

Ni do juĝis oportuna dissendi kun tiu ĉi n-o de « S-ulo » ne nur nian Tarifon pri kotizoj k abonoj, kiel ĉiujare en tiu ĉi sezono, sed plie nian plej novan katalogon, kiu cetere entenas ankaŭ la gazet- k membro-tarifojn. Ni insistas, por ke ĉiu aktiva SAT-ano fariĝu kvazaŭ reprezentanto de SAT en siaj rilatoj kun ne-SAT-anoj, aparte kun tiuj, kiuj finis la lastajn kursojn kun sukceso k nun bezonas esperantan legaĵon. Ĉiu el ni propagandu por la idealo de SAT, prilaŭdu la valoron de nia literatur-kolekto. Al la malnovaj esperantistoj, samkiel al la junbakitaj, ni montru la neceson posedi nian « Plena Vortaro »n por majstri la lingvon.

Ni demonstru al ili, ke SAT estas la sola esperanto-asocio, prolettendenca k tutmonda, kiu, spite la krizon, certigadis la **regulan** aperadon de du monataj gazetoj, de Jarlibro ktp. — ke SAT estas la sola racia solvo de efektiva, fakta, nesurpapera unueco ; — ke SAT estas la organizo, en kiu devas ariĝi ĉiuj prolet-esperantistoj, kiuj ne malinteresiĝas pri la sorto de sia klaso. — ANTAŬEN !

(1) Ni uzas tiun ĉi neologismon, por esprimi la *malplivalorigon* de monvaluto kompare al la ora normo. Ni preferas la formon *devaluo* al *devaluacio* (kiel ni uzas : *evoluo* anstataŭ *evolucio*).

Favor-oferto por fru-aliĝantoj :

Kamaradoj, kiuj pagos sian kotizon por 1937, la tuton aŭ parton el ĝi, ĝis la 31. januaro, rajtos aĉeti po UNU el la sekvantaj libroj (laŭ elekto) je granda escepta prezo :

IZGUR, Je la Nomo de l'Vivo, 224 paĝoj, por **7.50** fr. fr. (anst. 12.— fr. fr.) kataloga prezo.

GILLES, Skizo pri Filozofio de la Homa Digno (Trad. Lanti), 148 paĝoj, broŝur. por **7.**— fr.fr. (anst. 10.— fr.fr.) ; bindite por **10.**— fr.fr. (anst. 14.— fr.fr.).

HAŜEK, LA BRAVA SOLDATO ŜVEJK, 154 paĝoj, broŝ por **7.**— fr. fr. (anst. 10.— fr. fr.) ; bind. por **10.**— fr. fr. (anst. 14.— fr. fr.).

K-doj, kiuj eventuale jam posedas tiujn 3 librojn (sed nur tiuj!) elektu alian libron (escepte de PL. VORTARO) laŭ nia katalogo k dekalkulu esceptan rabaton de 40 % je la originala prezo.

Atentu la templimon ! Ĝi ne estos plilongigita ! Frupagantoj plifaciligas serioze la administracian laboron. Ju pli frue vi kotizas, des pli glate ni povas prizorgi vin !

Retrospektive k perspektive !

Kial ni presigis dukolore la lastnumeran fruntpaĝon ? — tiel demandis nin kelkaj legantoj. Duobla motivo estis por tiu festkoloro : la unua estas la invito de l'Organiza Komitato al la Kongreso de SAT en Roterdamo, *okazonta* en la jubilea jaro de *l'lingvo esperanto (1887-1937), kongreso kiun ni ĉiuj deziras do speciale brila k impona. Kaj la dua motivo estas, ke, kun tiu numero,* « *Sennaciulo* » *eniris* la 13-an jaron de sia ekzistoperiodo. *Fondita kiel semajna organo de SAT post la Brusela kongreso, en 1924, ĝia unua numero aperis komence de oktobro 1924. Ĝi restis semajna ĝis la skismo en la movado. Poste ĝi fariĝis dusemajna, k de kiam ĝi estis malŝarĝita de la kunlaborajoj, kiuj ne rilatas rekte al la esperanta movado, ĝi estis monata, dum « Sennacieca Revuo » transprenis la ceteran materialon (socipolitikan k literaturan).*

K-doj, kiuj do volas plene vivi la SAT-vivon, ne kontentiĝos pri la legado de la nura oficiala organo, sed ili estas samtempe abonantoj al « Senn. Revuo », la dua organo de SAT duoble pli ampleksa ol « Sennaciulo » k ilustrita. Nur abonante ambaŭ organojn, vi havas la necesan intiman kontakton kun via organizo, ĉar ĉiun duon-monaton vi trovas gazeton de SAT ĉe via hejmo : la 10-an — « S. Revuo »n, la 25-an — « Sennaciulo »n. La lastmonata dukolora n-o de « S-lo » eldoniĝis en kvanto de 6.000 ekzempleroj : tio estas la plej alta eldonkvanto ĝis nun atingita ! presita n-o ni posedas ankoraŭ sufiĉan, kvanton, por disponigi ĝin kontraŭ modera pago (10 ekz-oj por 5 fr. fr.)

al varbistoj. Hodiaŭ la proporcio de disvastigo sur la terglobo de niaj SAT-ajoj bedaŭrinde ne estas tre egaligita; unuflanke disvastiĝas en la nederlandlingva teritorio multaj miloj da ekzempleroj, ĝis en la plej eta vilaĝo; — aliflanke iuj teritorioj (eĉ nefaŝistaj!) estas tro maldense prisemitaj. La laboristaj espistoj en la mondo devas respondi potence k entuziasme al la grandaj propagandaj klopodoj de la nederlandaj Gek-doj, por ke stariĝu sana ekvilibro en la disvastiga ritmo de nia movvado.

La problemo ne estas nova, sed ĝi estas ankoraŭ aktuala. Precipe ni turnas nin al la K-doj en Svedio, kie ekzistas forte elkonstruita L. E. A., por peti ke ili pli ol ĝis nun alkutimigu siajn kursanojn k ellernintojn al la ideo fariĝi membroj de SAT k legi tutmondajn gazetojn. Il iru sur la vojo de la nederlandaj K-doj, ili ankaŭ penu penetrigi « S-ulon » ĝis en la plej eta vilaĝo de Laponio aŭ de Vermlando, por partoprenigi ĉiujn lab. esp-istojn, super la landa skalo, en la granda familia rondo tutmonda, kies organiza esprimo estas SAT.

K-doj, kiuj havas multajn korespondantojn tra la mondo, dissendu al siaj eksterlandaj amikoj nian organon, por ke tiuj lastaj ekkonu nian laboron k estu interesataj pri nia movado.

Perantoj de SAT! *Ne forgesu vian gravan taskon ĉe la fino de la jaro. Ne kontentiĝu pri la membronombro elmontrita pri via loko en la lasta Jarlibro. Plialtigu ĝin, pruvante per tio ke vi estas la ĝusta viro sur la ĝusta loko, kiel diras proverbo... eĉ se kelkfoje vi estas K-dino!*

Al ĉiuj informpetantoj ni sendas specimenaj ekzemplerojn de niaj gazetoj k katalogon tute senpage. Ni kolektas la adresojn de varbebluloj (sed oni komuniku nur adresojn de vere seriozaj K-doj, pri kies varbiĝo ni rajtas esperi, por ke la elspezo restu ĝust-proporcia kun la rezulto!).

Kaj nun al la laboro, K-doj, por pli granda SAT!

Armita paco !

Eŭropo similas al vazo el malbona lado, kiu antaŭ dudek jaroj jam ricevis seriozan kontuzon treege malbeligintan ĝin. Intertempe krevis kiel vezikoj sur ĝia surfaco pecetoj da rustinta ferajo. La aspekto de Eŭropo pli k pli malboniĝas. La danĝera maniulo el Romo deklaris la militon al la **Paco per malarmado,** al la **Paco en kolektiva klopodado k reciproka konfido.** Li proklamis la feran pacon, la pugnan pacon, la armitan pacon balanciĝantan sur la pinto de bajonetoj — leĝo de Eŭropo, leĝo de l'Mediteraneo, leĝo l'Balta k de l'Norda maroj, leĝo de l'Nigra maro, leĝo de l'Oceano. Anstataŭ bongusta trinkaĵo fluas el la kontuzita vazo Eŭropo malbonodora puso...

Kie restas la konscienco de l'popoloj? Cu ĝi **ne plu** ekzistas? Aŭ ĉu ĝi **ankoraŭ** ne ekzistas? Ja eble ĝi neniam ekzistis? Sajnas, ke ĉi lasta supozo estas la ĝusta. La konscienco de l'popoloj dormas en la profundo, k oni devas ĝin veki; ĝi formiĝas en la subo de l'homaj estaĵoj kiel burĝono, sed ĝi ne ankoraŭ iĝis manifesta, ne ankoraŭ transformiĝis en aktivecon sufiĉe fortan por detrui la malbonfaran influon de politikaj krimuloj, la pereigan spiriton de l'naciismo, militismo, superregismo k kapitalismo.

Tamen, mi fidas en la laboristaro. Nenia alia klaso ol tiu de l'popolo laboranta, kreanta ĉiujn produktojn, ĉiujn valorojn, k de kiu fine dependas la tuta funkciado de ajna socio, kapablas solvi la problemon pri paco. Mi fidas la laboristaron, ĉar ĝi manipuladas la produktilojn, k kiam ĝi havos plenan konscion, ĝi ekregos la produktilojn por ilin utiligi kontraŭ la ekspluatantoj k iliaj lakeoj k ordonplenumantoj. Tiam la produktiloj ne plu servos por fabrikadi mortigilojn, nek por subpremi la unujn fare de l'aliaj; ili servos por triumfigi la ideon de l'Eterna Paco inter la Homoj k por certigi la pludaŭron k progresadon de l'homa speco sur la fundamento de harmonia kunlaborado sen-envia k sen-konkura.

Mi estas konvinkita, ke la lingvo esperanto ludos gravan rolon en la interpacigo de l'popoloj. Ĉar estas absolute necese, ke ĉio fremda formalaperu el la koroj de l'homoj, k ke ennestiĝu en ili la sento de familiaro k de konfido. Nur tiam simplaj homoj vere povos senti sin fratoj. La lingvo estas la plej grava elemento en tiu procezo; la diverslingveco interfremdigas homojn, la unulingveco kreas eduk-k spirit-komunecon. Tial ni esperantistoj ne laciĝu varbi, varbadi por nia afero; ni estu firme konvinkitaj, ke ni semas pacon, ke ni detruas la bazon de tiuj fiereguloj, kiuj hodiaŭ je la nomo de l'Naciismo trompas la simplajn homojn, pentrante al ili absurdajn bildojn pri Paco ripozanta sur la pinto de bajonetoj. Esperanto estas pli ol nura teknikaĵo; ĝi estas sennaciigilo. N. B.

Timigaj nombroj

En la « Haga Monatgazeto » iu d-ro Luning Prak donas kelkajn nombrojn pri la konstanta kreskado de la loĝantaro en Eŭropo k pli detale de la nederlanda popolo.

La loĝantaro de Eŭropo. laŭ la artikolo, plimultiĝis de la jaro 1800 ĝis hodiaŭ per 325 milionoj da homoj, tio estas, ĝi kreskadis de 175 milionoj ĝis 500 milionoj..

La loĝantaro de Nederlando sumiĝis en la jaro 1829 je 2.600.000 da homoj, en 1934 je 8.400.000. Sube troviĝanta tabelo montras, ke la kresko ĉiam plirapidiĝis.

Jaro	1829	2,600,000
»	1869	3,600,000
»	1899	5,100,000
»	1909	5,900,000
»	1920	6,900,000
»	1930	7,900,000
»	1934	8,400,000

La nombro da naskiĝoj en la jaro 1875 estis po familio 7,75; en 1900 ĝi malaltiĝis ĝis 6,21; en 1908 ĝis 5,20. Gi ankoraŭ konstante malaltiĝas. La rapida kresko en la lasta tempo estas kaŭzata de la medicino, kiu grave malgrandigis la nombron da infanmortoj.

En la jaro 1897 la nombro da mortoj inter infanoj malpli ol 5-jaraj estis 16,5 % sur la kamparo; en la urboj 24,8 %. En 1927 ĉi tiuj nombroj malaltiĝis ĝis 9,3 % k 9, 3 %. Laŭ la artikolo la nombro da infanoj ĉe laboristaj familioj estas pli granda ol en la familioj de intelektuloj. Krome la nombro ĉe familioj kun pli altaj enspezoj estas malpli granda ol ĉe familioj kun la plej malaltaj salajroj. Oni citas studon de d-ro Sanders pri 2.500 familioj en Roterdamo.

Laŭ tiu studo la oficistoj havas plej malmulte da infanoj (mezkvante du). Tiam sekvas la intelektuloj (verŝajne oni celas la pli riĉajn tavolojn — **Trad.)** k la kvalifikitaj laboristoj, la butikistoj. La nekvalifikitaj laboristoj estas plej «riĉaj». Ili havas mezkvante 4 infanojn. Krom tio, en tiu grupo oni plej frue geedziĝas.

Gis ĉi tie la artikolo de d-ro Luning Prak, kiu tute ne instigas al limgado de naskiĝoj. Li nur donas ciferojn, parolas pri la ekonomia malordo, sed venas al nenia konkreta ideo por normaligi nian socian vivon. Sed ni, laboristoj, devas lerni per ĉi tiuj ciferoj, ke la problemo pri homa multobligado estas tre konsiderinda. La progresado de la medicino nur povas esti beno por la homaro, se ni aliflanke tre racie limigas la naskiĝnombron.

Kaj ree ni povas konstati, ke kie regas plej da mizero, tie la racio plej malfacile povas enpenetri. Kontraŭstari la homan mizeron, jen tasko de la politikaj partioj; kontraŭstari la malraciemon, jen unu el la taskoj de SAT. B. W.

El Palestino

En la jaro 1934 fondiĝis en Palestino organizo kontraŭfaŝista « ANTIFA » grupanta judajn k arabajn laborulojn, kiu celas, sin apogante sur ĉiujn progresemajn k demokratajn elementojn en la lando, kontraŭbatali la naciecan malamon k ŝovinisman propagandon dividantan la du popolojn. Dum sia dujara ekzisto ANTIFA fariĝis la sola kontraŭfaŝista organizo, kiu kapablis arigi ĉirkaŭ si, vere ankoraŭ malgrandan nombron, sed tamen la plej sinceran parton de la judaj k arabaj elementoj, kiuj pretas senlace k kuraĝe bari la vojon al la ĉion detruanta faŝismo k krei en Palestino spite al ĉiuj nenaturaj obstakloj judaraban interkomprenon. La lastaj teroragoj k sangaj bataloj, kiuj daŭras jam ses monatojn k kiuj plifortigis ankoraŭ la muron de rasmalamo inter la judaj k arabaj amasoj, montris klare la rolon de l'faŝismo k de la brita imperiismo k evidentigis la historian rolon, kiun devas ludi ANTIFA por krei pacon k harmonion inter la du popoloj surloĝantaj la landon.

Por la brita imperiismo Palestino, kiu dum la daŭro de la lastaj jaroj akiris valoron kiel strategia bazo k ekonomia faktoro por la angla ŝtato, kiel ŝlosilo al Hindio, servas nur kiel ilo por ĝiaj imperiistaj celoj. Fidela al la formulo « Dividu k regu » ĝi incitas unu parton de la lo-

ĝantaro kontraŭ la alian, kvereligas la judojn kun la araboj por pravigi sian estradon. Ne estas do mirinde, ke dum la 18 jaroj de sia mandatregado eksplodis jam kvin fojojn teruraj pogromoj k sangelverŝado. Sub la preteksto de pacigado ĝi venigis dum la lastaj okazaĵoj grandan nombron de soldataro, k envere ĝi servas nur kiel gardposteno al la Suez-Kanalo.

La imperiistaj celoj de la brita registraro harmonias kun la sociaj interesoj de la araba feŭdismo. La Efendoj estas sangaj malamikoj de la juda enmigrado, ĉar ĉi-lasta evoluigis la landon el feŭda ŝtato al kapitalista, ĝi transformis la ekonomion de la lando k disfaligis la bazojn de l'forevoluinta feŭdismo. Ne por defendi la felaĥojn (malriĉajn terlaboristojn) la arabaj terposedantoj, kontraŭloj de ĉiu agrara reformo, postulas la ĉesigon de la juda enmigrado k tervendado (kvankam ili riĉiĝis ĝuste dank'al tin tervendado), sed por konservadi siajn terposedaĵojn, la bazon de la feŭda superregado.

Dum la lastaj ses jaroj Palestinon envenis 183.000 personoj. Nuntempe la juda loĝantaro en Palestino sumiĝas je ĉirkaŭ 400.000 homoj. La plej granda parto de la enmigrintoj establiĝas en la vilaĝoj k okupiĝas pri agrikulturo. En la urboj ili penetras en ĉiujn branĉojn de la industrio: metalurgio, domkonstruado, transporto, ktp. Unu kvarono el la tuta juda loĝantaro en Palestino estas gelaboristoj.

La juda enmigrado iĝis la motoro de ekonomia k socia progreso. Gi kreis en la lando antaŭe dezerta k senfrukta novajn laborfontojn. La evoluo de la lando influis grandskale la araban loĝantaron,

Instruu vin pri la pasinto de nia Movado!
Legu la faktoriĉan broŝuron de
G. P. de Bruin
Laborista esperanta movado antaŭ la mondmilito
36 paĝoj. Form. 14 × 20 cm.
Prezo : 4.— fr. fr. afrankite.
Ĵus aperinta !
SAT, 67, aven. Gambetta, Paris 20.

kiu kreskis de 570.000 al 905.000. Sole dum la du lastaj jaroj 30.000 araboj el najbaraj landoj trovis laborokupon en Palestino. Estas nur bedaŭrinde, ke pro nacia ŝovinismo la 100.000-membra profesia organizo de la juda laboristaro « Histadruth » rifuzas akcepti en siajn vicojn k organizi la arabajn ekspluatatojn, puŝante ilin en la brakojn de l'araba faŝismo, pligrandigante tiel la nacian antagonismon disigantan la du popolojn, el kio profitas la Mufti-partio k la brita imperiismo.

ANTIFA celas detrui la faŝistajn fortojn de ambaŭ popoloj, prepari la ekeston de paco inter la laborul-amasoj, forigi el iliaj koroj la egoistajn naciecajn sentojn. ANTIFA proklamas la labor- k ekzistorajton de ĉiu laborulo sen diferenco de nacieco.

Dum la last-septembra Packongreso en Bruselo reprezentis Palestinon, unuafoje en la historio, jud-araba delegitaro, reprezentantoj de ANTIFA.

Laŭ Esperanta Informservo de l'ANTIFA

UNIVERSALA KONGRESO K NACIEMO

Ni ĵus ricevis specimenon de la afiŝo, kiun eldonis la organiza komitato de la 29-a Universala Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 7-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1937 kiel Jubilea Kongreso en la ĉefurbo de Polio, kie loĝis d-ro Zamenhof k kie li kreis sian lingvon. Sur la afiŝo de tiu universala kongreso la nomo de la internacie konata kongresurbo portas nacilingvan veston! Oni skribas «Warszawa» anstataŭ «Varsovio». Kvankam oni scias, ke Zamenhof mem rekomendis minimume por internacie konataj geografiaj nomoj la esperantigitan formon, k ke oni legis en la « Fundamento de Esperanto » kiel **ekzemplon** por urbloĝanto: **Varsoviano** (same kiel **Parizano** k **Nov-Jorkano)!** Kiel do kredi je la **universaleco** de l'jubilea kongreso, se sur ĝiaj propagandiloj oni trovas naciaĵojn? Oni pretekstas glorigi la verkon de Zamenhof, k dume oni piedpuŝas ĝin, enirigante tra kaŝpordo la fremdan al ĝi spiriton de l'naciismo!

(Ni diru, ke la L.K.K. uzas ankaŭ la du (!) internaciajn formojn *Varsovio* k *Varŝavo* en siaj cirkuleroj, sed tio ne forviŝas la malbonan impreson, kiun faras la dufoje ripetita nacilingvaĵo sur tiel reprezenta dokumento, kia estas propagand-afiŝo !)

ATENTU GEK-DOJ! K-do *M. Demmenie*, 3e Oosterparkstr. 17, *Amsterdam (O)*, transloĝiĝis al *Roterdamo*, Dijkstraat 20. I. La taskon de sekretario de I. O. de I.F.E.T.T. transprenis K-do *J. Lok*, Orthelíusstr. 108, III, *Amsterdam (W)*.

LA ERARO DE MARSO



TEATRAJETO VERKITA DE TORF. AGLO.

Por prezenti ĝin propagandcele, la grandlitere presitaj partoj nekursivaj estu tradukitaj *nacilingven*. La esperanta parto ne bezonas klarigon al neesperantisto, ĉar la prezento per si mem k la antaŭa nacilingva parto donas sufiĉan klarigon. En Amsterdamo la teatraĵeto estis prezentita kun plena sukceso. La nura prezentokondiĉo estas, ke oni sendu ekzempleron de nacilingva traduko k raporton pri la rezulto de l'prezento al : F. L. E., Postbus W. 6, *Amsterdam. W.*

Ludantoj : Marso, Eŭropo, Azio, Aŭstralio, Ameriko k Afriko. — Marso estas plenaĝulo, la aliaj roloj estu prezentataj de infanoj.

UNUA SCENO. Sur la scenejo en la mezo staras *Marso*. Li estas plene kovrita per vesto simila al tia de « KU-KLUKS-KAN ». Nur estas truetoj antaŭ la okuloj k en la vesto estas du fendoj, tra kiuj eblas eligi manon. Sub la vesto li portas sur si pafilon, kanonon, sabron, bombon k flugmaŝinon (imititajn). Sur la scenejo estas tablo, sur kiu eblas labori; ĉirkaŭ la tablo estas volvita nigra papero, tiel ke ĝi aspektas kiel kesto, sur kiu frontflanke estas desegnita la emblemo de veneno (skeleta kapo kun krucitaj ostoj). Super tiu emblemo estas la vorto (nacilingve) « Municio ». Sur la tablo, nevidebla de la publiko, estas la jam farita verda stelo. La armiloj ankaŭ povas kuŝi tie. *Marso* ankaŭ povas surhavi kirason, anstataŭ K.K.K.-veston. Li staras senmove dum la unua elparolo de l'monologeto : lia parolo estas malrapida, sed sonas severe. (Ĉe la malfermo militista muziko aŭ tamburado.)

Marso: Aŭdu! Heroa kuraĝo! Fidelo! Libero! Kampo de Honoro! Ŝtato kontraŭ ŝtaton, homoj kontraŭ homojn, kanonoj kontraŭ kanonojn, kuglo kontraŭ kuglon, venengaso kontraŭ venengason. Murdo! Sango! Malamo! Venĝo! Funebro! Detruado! Ha, ha! Mi konas ilin, miajn klientojn. Ili estas regnestroj, diplomatoj, borsospekulaciistoj, k post ili la popoloj incititaj de ili en mia nomo. — Vidu, kiel ili envicigas sin...! Unu grupo ne scias kion volas la alia. Malfido regas. Ha, rigardu, la landoj fermas siajn limojn! Por mi la tero estas dividita en ŝtatojn, en landojn, en naciojn. La popoloj ne komprenas unu la alian. Ili ĉiuj parolas alian lingvon. Ilia dividiteco estas mia ekzisto, mia potenco. Tial ili fidas min! Ili venas al mi por konsilo. La tero estas malkunigita. Kvin mondpartoj ekzistas, dividitaj inter si. Mi konas ilin k ili konas min. Ili venas al mi, tiuj ĉi kvin! Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko k Aŭstralio...

DUA SCENO. — La ludantoj (kontinentoj) estas rekoneblaj per skarpoj, sur kiuj estas skribitaj iliaj nomoj. Marso *k* Eŭropo.

Eŭropo (surirante la scenejon, al Marso), en la mano arkon de figursegilo. Halo! maljuna krimulo! ne fanfaronu tiel. Prefere diru al mi, kie mi povas trovi Azion, Amerikon, Afrikon k Aŭstralion. Rigardu, jen mi havas la arkon de figursegilo. Mi scias, ke la aliaj havas la ceterajn partojn. Mi volas fari belegaĵon per tiu ilo.

Marso: Jes, vi nomas min krimulo. Sed sciu do, ke vi ne povos atingi ion sen mi. Neniam ili cedos al vi siajn partojn. Se vi volas atingi vian celon, vi devos perforte devigi ilin. Batalu, batalu, mia filo, por viaj idealoj k por via ekzisto.

Eŭropo: Sed pro tio ni ja ne bezonas mortigi unu la alian. Ni ja povus kunlabori, ni ja bezonas unu la alian?

FAKTOJ K OPINIOJ

Japanoj lernas anglan lingvon en mezlernejoj, sed tre malofte povas paroli ĝin. Germanan aŭ francan lingvon scipovas nur altkleraj homoj. Sed esperanton ili kapablas ekposedi en mallonga tempo. Kaj nun la urbanoj de Tokio havas grandan intereson pri la lingvo esperanto k multaj komencas lerni ĝin. Kaj post kvar jaroj oni povos vojaĝi Japanion nur per esperanto (Laŭ « Nia Programo » de Jap. Esp.-Instituto).

En Dancigo la germana sekret-polico observas la polan reprezentanton de la « libera ŝtato », ministron Papee k la reprezentanton de la Ligo de Nacioj, Lester. La ministro Papee demandis sian registaron, ĉu li tion devus publikigi en la pola gazetaro. La registaro neis. Do ĉio restas kiel antaŭe. Opoziciaj gazetoj estas malpermesitaj, opozicie pensantaj aŭ agantaj homoj estas arestitaj ; multaj estas senjuĝe kondamnitaj al malliberigo. Momente la ĉefaj viktimoj estas socialdemokrataj laboristoj. (J. K.).

La sprita redaktanto k eldonanto de l' «Suda Kruceto » (en Aŭstralio), **Sukro,** kolektis jenajn kino-novaĵojn (pri kies ĝusto ni malakceptas respondecon) : En Vieno la filmo de Ĉaplin « Moderna epoko » estis cenzurita, ekde kiam Kaĉjo vidiĝis svinganta la ruĝan tuketon. Eniri Sovetion jam estas malpermesite al la filmoj kun Ŝirlej Templ, kiu tiel senhonte kuraĝis dum iu dimanĉo ekĉeesti porinfanan diservon. La britaj radio-stacioj ne plu disaŭdigos la plej amatan himnon « Jeruzalemo », por ke s-ro **Fürer** (Gvidanto) povu aŭskulti sen senti sin ofendita. Antaŭ nelonge Sidneja radiostacio, disaŭdiginte la voĉojn de l'birdoj k bestoj en la zoologia ĝardeno, ricevis tre varman gratulleteron de iama... volapukisto.

S-ro Stanklif (Akron, Ohajo), statistikis la oftecon de l'prepozicio « de » per analizo de kvin esperantaj verkoj. Li konstatis, ke la ofteco de tiu prepozicio estas pli granda ol la tuta ofteco de tridek aliaj prepozicioj kunadiciita, nur escepte de **en, al, por** k **pri,** el la esperanta provizo de 35. Konsultante la « Plenan Vortaron », oni trovas, ke estas dek du (12) apartaj signifoj de la **de**-familio. Eĉ apartaj nuancoj en la **de**-familio superas laŭ ofteco tre gravajn prepoziciojn. Laŭ s-ro Stanklif la kategorioj en «P. V.» ne estas sufiĉaj ; li starigis dudek klasojn k pli (1). Li konstatis ankaŭ, ke « pozitiva k radikala diferenco evidentiĝas inter la stilo de Zamenhof en liaj traktaĵoj k artikoloj kompare kun liaj leteroj, poemoj k paroladoj ». (Laŭ « Scienca Gazeto »).

(1) Laŭ la plej granda vortaro en la mondo, « Oxford Dictionary of the English Language » (Oksforda Vortaro de la Angla Lingvo), ekzistas ĉirkaŭ cento da nuancoj por *of*, la angla vorto por *de* (do multege pli ol por la esperanta prepozicio).

La Jarkunveno de la **Labor-Partio** (brita) en septembro estis naŭza afero, — tiom naŭza, ke ĝi apenaŭ meritas priskribon. Mallonge antaŭe la estro de l'admiralitato, s-ro Hoare, alvokis por subteno inter la L. P.-anaro al la registara programo pri **rearmado.** Al tiu ĝi jese respondis, tiel ke neeblas rimarki iun ajn diferencon inter la sinteno de l'Labor-Partio k tiu de la konservativa registaro. Lastjare la brita registaro diris : « Sankciojn kontraŭ Italio » — la Laborpartio aprobis k subtenis la sankciojn. Ĉi-jare la registaro postulas « Pli da armiloj » k la Laborpartio denove konsentas : « Jes, ni subtenu la pliarmadon ». En okazo de milito la plej facile manovro por akiri la subtenon de l'laboristoj estas diri al ili : Ni devas protekti nian demokration. Vi batalu por ni kontraŭ la faŝismon ! La grundo prepariĝas kiel en 1914. (I. F.).

El ĉie ni ricevis nombron da laŭdaj k gratulaj leteroj pro la bela aspekto de la lastaj numeroj de « Sennaciulo » k « Sennacieca Revuo ». Ankaŭ la fakto, ke **pli da teksto** kovras la paĝojn de l'nun eldonataj numeroj de la revuoj, ne pasis nerimarkite. Kompreneble ni estas tre sentemaj por tiaj gratulaj skribaĵoj, al kies aŭtoroj ni kore dankas. Tio instigas nin klopodi, por fari pli k pli multvaloraj la revuojn, tiel ke ili vere laŭ ĉia rilato superu nivele la aliajn.

Marso : Hm, hm ! belegaj devizoj, mia filo, sensencaĵo. Vi ja scias, ke la aliaj ne komprenas vin. Parolu kun ili ! Faru ! Ili ne komprenos vin k kiam ili vidos, ke vi posedas tiel belan parton de figursegilo, nu, atentu !... ili forprenos ĝin de vi, se necese, perforte. Mia filo, faru kiel mi, k armu vin. Tiam la aliaj cedos al viaj deziroj. (Donas al li la pafilon). Sed rakontu al mi, mia filo, kion vi volas fari per tiu figursegilo ?

Eŭropo : Tion mi diros al vi, maljuna krimulo, — per tio ni volas fari verdan stelon.

Marso : Verdan stelon ? Kial ?

Eŭropo : Car, se ni sukcesos fari ĉi tiun verdan stelon, vi maljuna krimulo devos malaperi.

Marso : Sensencaĵo !

Eŭropo : Tamen, estas tiel. Ĉu vi ne scias, ke la verda stelo estas la simbolo de la mondlingvo ESPERANTO ?

Marso : Esperanto ? sensencaĵo ! Esperanto ne estas lingvo. Por kompreni unu la alian, oni bezonas vivantan lingvon.

Eŭropo (intertempe jam malproksimiĝis) : **Esperanto vivas !** (Li foriras).)

TRIA SCENO. Marso *k* Aŭstralio. *(La nova ludanto suriras la scenejon el alia flanko, al kiu la antaŭa ludanto foriris).*

Aŭstralio (suriras la scenejon, portante paketon da segiletoj por figursegilo) : Bonan vesperon, sentaŭgulo Marso, ĉu vi eble vidis la aliajn 4 mondpartojn ?

Marso : Nu, ĉu ankaŭ vi nomas min sentaŭgulo ? Pripensu, kion vi signifus sen mi ! Kun viaj gefratoj, la 4 aliaj mondpartoj, vi ja ne povas interrilati. Ili ne komprenas vin k vi ne komprenas ilin. Vi ne scias, ke Eŭropo volas posedi viajn segiletojn, por sia figursegilo. Jen **akceptu armilon !** (Donas al li kanonon.)

Aŭstralio : Kion mi devas fari per ĝi ? Tiu ĉi objekto ja dolorigas k mortigas k kaŭzas nur ĉagrenon. (Kun akcento). Mi tute **ne deziras militon !**

Marso : Jes, jes, ĉiuj diras tion, mia filo. Sed kredu al mi : Milito ĉiam estis k certe ĉiam okazos.

Aŭstralio : Tamen la milito estas malbona, ĝi ja estas maljusto. Mortigi la homojn estas malbonega.

Marso : Efektive, ĝi estas malbono, sed necesa malbono. Aŭskultu ! Oni volas ŝteli de vi ĉi tiujn segiletojn. Ĉu do vi ne batalos ?

Aŭstr. : Kial oni volas ŝteli ilin de mi ?

Marso : Oni volas fari ion per ili.

Aŭstr. : Jes, mi scias, verdan stelon ni volas fari.

Marso : Verdan stelon ? Sed tio estus nur ebla, se vi per la armiloj devigus la aliajn.

Aŭstr. : Kial do ?

Marso : Car ili ja ne komprenas cin.

Aŭstr. : Sed la verda stelo estas la simbolo de Esperanto : Unu lingvo, ĉie, en la tuta mondo.

Marso : Ha, ha ! unu lingvo en la tuta... Tio estas neekzistipova, ĉar tiu lingvo ne povas esti parolata.

Aŭstr. *(intertempe jam malproksimiĝas): MI PAROLAS ESPERANTON. (Foriras).*

(Finota).

Organizu la korespondadon

Tre grava estas tiu temo, kiun K-do Kalkman pritraktis en la antaŭa n-o. La organizado de l'korespondemuloj estas problemo, kiu nepre devas esti solvata, se ne multaj fervoraj komencantoj seniluziiĝos k forlasos nian movadon. La motivo de ĉi tiu artikoleto estas la rezulto de korespondanonco metita en « S-ulo » n. Ho jes, ĝi estis tre fruktodona anonceto ! Mi ricevis entute 70 (sepdek) respondojn, k inter ili venis 45 (kvardek kvin) el Nederlando sola. Kompreneble mi devis al la plimulto sendi nean respondon ; sed tion mi faris kun bedaŭro k malkontento, ĉar multaj skribis ke ili jam du-trifoje respondis anoncojn pri korespondado, sed ĉiam vane.

K-do Kalkman ankaŭ skribas pri la malfacilaĵo de senlaboruloj ŝpari la monerojn por afranko de siaj vanaj leteroj. Mi supozas, ke estas la sama kaŭzo kiu malebligas multajn anoncintojn respondi al ĉiuj. Sendi 70 leterojn aŭ poŝtkartojn eksterlanden postulas ja ankaŭ iom da mono.

Estas evidente, ke ĉi tiu maniero por interkontaktigi ne estas ideala. La korespondemuloj devas esti organizotaj. Oni devos eviti la nunan hazardan korespondserĉadon. Sed kiel ? Ĉu per kunlaboro de l'landaj perantoj aŭ per propra oficejo en la SAT-movado? La plej bonan solvon K-doj pli spertaj ol mi devas doni. Utiligu la korespondemon por la progreso de esperanto !

Jono MARTELO *(Norvegio).*

LA SEKCIO UTRECHT I « FRATECO » okazigos letervesperon lundon, la 21-an de decembro. Ni atendas multajn leterojn. Adreso : K-do *Grotenberg,* sekr., Lange Lauwerstr. 21 bis, *Utrecht,* Nederl. Respondo garantiata.

Al tiu ĉi numero estas aldonita la nova Katalogo de l'SAT-eldonaĵoj, entenanta la Tarifojn por 1937.

Tra la esperanta gazetaro

PATRIOTA EDUKADO

« Mondo » (Ŝanĥajo) publikigas en n-o 8 du leterojn de sovetiaj instruistinoj, laŭ « Soveta Lernejo » (n-o 4). Isajea Eŭlampia Ivanovna, instruistino en la 21-a mezlernejo de Saratov, skribas i.a.: « ... Nur post la Oktobro mi ricevas la eblecon eduki vere liberajn, sanajn k spirite fortajn gejunulojn. ...Miloj da miaj estintaj lernantoj aktive laboras por bono de la patrio k mi sentis, ke mi faris multajn utilojn al mia patrio, al mia lando. Mi havas 65 jarojn, sed mi ofendiĝas, kiam oni parolas, ke mi estas maljunulino. En nia lando ne ekzistas maljunuloj... Saĝa proverbo tekstas : « Ankaŭ sur maljuna arbo kreskas verdaj folioj ». Miaj verdaj folioj estas centoj da infanoj, kiujn mi instruas k edukas por nia patrio. Mi estas certa, ke mi vivos ankoraŭ 35 jarojn, k ilin ĉiujn mi fordonos por la infanoj. »

Komento superfluas. Melankolie oni konstatas ripetiĝon en la Historio, memoras pri .1789, 1793...

Cetere, « Mondo » estas absolutista gazeto, kiu allasas nur unu Veron, nome la bolŝevikan; pro tio ĝi ne ĝeniĝas kalumnii ne-samopiniantojn.

KRITIKI PLI VALORAS OL FLATI

En la oktobra n-o de « Nia Gazeto » ni trovas trafan « flugfolion », kiun subskribis ERA (malnova esp-isto). Per delikataj langopikoj li atakas « grandegulon » Kaloĉai, konstatante simple, ke plivastigo de esperanto (per propagando) ŝajnas al li pli necesa tasko hodiaŭ ol pliriĉigo de l'esp. literaturo. Por ĉi lasta celo nome pledas Kaloĉai, kiu opinias, ke oni povus kontraŭpezi per bonfarto de l'literaturo la malbonfarton de l'organiza stato de nia movado. La konstato de ERA venas ĝustatempe, malgraŭ ke ĝi malharmonias en la koncerto de laŭdego, kiun aranĝis en ĉi lastaj monatoj la esp. gazetaro al Kaloĉai k Bagi. Niascie « Nia Gazeto » estas la sola granda gazeto (krom la SAT-gazetoj), kiu ne publikigis la portretojn k la flataĵojn al la « fama paro ». — Makulo en tiu ĉi n-o estas la « Lingva rubriko », en kiu ĝuste svarmas la plej deformigaj preseraroj !

LA GRANDIOZA ERARO

Sub ĉi tiu titolo s-ro Teo Jung pritraktas larĝe en la 2-a n-o de la ĵus reaperinta « Heroldo de Esperanto » (Red. k Adm. Harstenhoekweg 223, Hago-Ŝeveningen) la malpermeson de esperanto en Germanio fare de la nacisocialismo, per dekreto de la supera polica komandanto SS Himmler, k speciale ankaŭ la malpermeson eldoni « Heroldon » plue en Germanio. Li tradukas la esperon de l'germanaj esp-istoj per jenaj vortoj: « ankaŭ la germanaj esp-istoj ne forlasis nian aferon. Provizore ili ne plu povas kunbatali kun ni en la sama fronto, sed en siaj koroj k spiritoj ili restos fidelaj, ĝis kiam ankaŭ por la germ. esp-movado malaperos la nuna nokto de funebro k glore reaperos la suno de nova laboro por la amata idealo. »

Ankaŭ « Esperanto Internacia », oficiala organo de I.E.L., aperis (formato de « Sennaciulo »). Redaktas ĝin la sama Teo Jung. La unua n-o entenas malnovaĵojn aperintajn antaŭe jam en « Esp. Triumfonta »; ĝi do ne permesas al ni seriozan recenzon. (Jarabono kun kotizo : 35 fr. fr.).

BATO DE FRATO ESTAS SEN KOMPATO

En « Le Travailleur Espérantiste » de oktobro M. Bubu, parolante en la IPE-rubriko pri « lukto por unueco » asertas, ke « IPE estis la iniciatinto de l'vasta internacia kolektiv-koresponda movado (PEK) ». K-do Bubu ŝajne havas malfortan memoron ; ni konsilas al li trarigardi la malnovajn jarkolektojn de « Sennaciulo », en kiuj ĉiunumere li renkontas proponojn pri kolektiv-korespondado k eĉ tutan paĝon ĉiusemajne de peresperanta gazetservo (redaktitan de K-do Besler k financitan de SAT). Tio okazis longe antaŭ la ekzisto de IPE.

KIEL EN LA TEMPO DE LA IDO-SKISMO

Lidia Zamenhof trovas akrajn vortojn rilate la novajn gvidantojn de l'movado. En « Informoj de Esp.-Asocio de Estonio » (okt.) ŝi skribas « ... la gvidantoj de la movado trovis pli facila elvoki skismon kun eble neantaŭvideblaj konsekvencoj, ol subiĝi al la statuto... Laŭ la decido de nur naŭ komitatanoj la landaj Asocioj estas petataj tuj eksiĝi el UEA k fondi novan asocion. Kaj se tiuj Asocioj aŭ delegitoj ne sekvos la gvidantojn sur la novan vojon ? Tiam okazos civila milito en Esperantujo, — ĉar ke UEA restu eĉ sen tri membroj, tio ja ne okazos facile. Se la estraro k kelkaj komitatanoj foriras, oni elektas aliajn... Okazis en 1907, ke la esp. popolo restis « armeo sen ĉefoj », k la senĉefa armeo venkis la senarmeajn ĉefojn ».

Tiuj ĉi diroj montras, kiel profunda estas la nuntempa malakordo, ĉe la neŭtraluloj.

ĈU NEESPERANTISTOJ GVIDU LA LAB. ESP. MOVADON?

En la ĵus aperinta duobla kajero de « Herezulo » (jul.-dec.) K-do Lanti trafe pritraktas la veran *esperantistan* problemon en artikolo « Paraleloj », kiu celas veki la konsciencon de ĉiuj, kiuj konsideras esp-on ne kiel akcesoraĵon, sed kiel aferon, al kiu indas dediĉi siajn plenan energion k liberan tempon. La artikolo estas tiom pli interesa, ke ĝi esploras objektiveme la profundajn kaŭzojn de la skismo en la lab. esp. movado. Lanti avertas kontraŭ la danĝero de l'tendenco, kiu subtenas la internaciisman organizmanieron en la lab. esp. movado (tendenco, kiun reprezentis k por kiu pledis Kibl ĉe la lasta kongreso de SAT) : danĝero, kiu kuŝas ĉefe en tio ke *neesperantistoj* (simplaj simpatiantoj al la ideo de esp-o) povas influi per siaj voĉoj la gvidadon de la movado !! Tiun danĝeran tendencon blokis SAT per sia sennacieca organizsistemo. Ĝi eltenas la saman batalon, kiun eltenis okaze de la ido-skismo la anoj fidelaj al la « interna ideo » kontraŭ la *help*-lingvanoj- « tujpraktikuloj » ĉirkaŭ De Bofron.

SALUTON K HONORON AL LA VALENCIANOJ!

Komence de novembro aperis la *unua* n-o, 6-paĝa (formato : 22 × 32 cm), de revuo « Popola Fronto » (duonmonata), eldonata de la *Laborista Esperantista Grupo* en *Valencio* (adr.: str. Mar, 25). Subtitolo : Informa Bulteno pri hispana lukto kontraŭ la faŝismo. La informoj ne pretendas esti aktualaj, sed la gazeto estas tre bone prezentita, bele presita k zorge redaktita en bona esperanta lingvo. Artikoloj de arda batalvolo. Kontribuo libervola atendata (monsendojn adresi al K-do *Antonio Pont*, Pl. Republica, n. 2, *Valencia.*) Karakteriza jena eldiro : La hispana popolo preferas morti stare ol vivi genuflekse.

GRAMOFONDISKO.

« La Internacio » « La Espero » kantita de miksita kanthoro en Stokholmo. Prezo : 3 sv.kr. plus afranko. Por Francio, Belgio, Polio, Anglio k Ĉeĥoslovakio 2 svkr., Italio k Aŭstrio 2,60 kr. Mendo k pago al *O. Hj. Olsson*, S : t Eriksgatan 85, *Stockholm*, poŝtĉeka konto 57650. Ĉe mendo de 10 ekz. 20 % da rabato. Ekspedo nur post antaŭa pago.

La bolŝevika partio deklaris, jam en 1914, ke ne la Sankta Unio kun la krima burĝaro estas necesa, sed la civilmilito kontraŭ ĝi, tio estas la revolucio. La devo de l'proletaro estas, antaŭ ĉio, RENVERSI sian propran burĝaron.

N. BUĤARIN.

Frakcia vivo

SENNACIISTA FRAKCIO

Estas tute vere, ke la sennaciismo ne estas identigebla kun la « proleta internaciismo » : etimologie, principe k praktike ĝi ja tute diferencas. Sed estus ankaŭ ofenda al la vero la aserto, ke por esti sennaciisto necesas malkonfesi la marksismon. Tio estus same arbitra, kiel estus la postulo konfesi tiun lastan doktrinon. Kiuj estas intelekte kontentaj per la klarigoj de la historia materialismo, tiuj ĉerpu argumentojn ĉe Marks por pravigi nian ismon. K-do L. Lora, en la antaŭparolo al la tria eldono esperanta de *La Komunista Manifesto* mencias, ke la preferita devizo de Marks estis : *dubu pri ĉio.* Kun tia « marksismo » ĉiuj sennaciistoj povas eĉ simpati, ĉar tiele klarigata ĝi ne estas rigida dogmo, sed nur esplormetodo.

Estus por nia celo tute vane diskutadi, por decidi, ĉu la ekonomio « kaŭzas » aŭ nur « kondiĉas » la evoluadon de l'homaj socioj. Sufiĉu al ni la interkonsento, ke ili evoluas, ial aŭ alial, laŭ direkto, kiu kondukas al pli k pli vastaj homgrupiĝoj. Nur dogmemaj elementuloj povas havi la ridindan pretendon, ke ilia filozofia kredo estas tute vera k sekve la sole diskonigenda. La sennaciismo ne povus akordiĝi kun tia absolutismo. La batalo por altrudi iun ajn kredon estas same stulta, kiel tiu por defendi la sendependecon de iu ajn nacio.

Kio ĉefe karakterizas nian sennaciismon, tio estas la rifuzo partopreni en agitado aŭ batalo por « liberigi *nacie* subprematajn popolojn » k la gravan rolon, kiun ni atribuas al la uzado de sennacieca lingvo. Tiurilate ni tute samopinias kun Hitler. Li malpermesis la propagandon por esp-o k ĝian instruadon en Germanio, tial ke la uzado de tia lingvo povas nur « DIFEKTI LA NACIECAN SENTON DE ĜIAJ UZANTOJ ». Tio estas tute ĝusta ! Kaj estas pro la sama motivo, kiu igis la germanan diktatoron kondamni la artefaritajn lingvojn, ke ni uzadas k propagandas esp-on... Hitler estas pl inteligenta aŭ almenaŭ pli konsekvenca ol Stalin, ĉar ĉi tiu lasta malatentis esp-on en siaj kvinjaraj planoj. Sed maliculo povus argumenti, ke ambaŭ diktatoroj estas same naciistaj. Estus ja facile kompili el iliaj lastatempaj paroladoj similan gloradon al la patrio, instigojn pri la neceso ĝin defendi ktp. Sed ni ne volas inciti la internaciistojn k nenial intencas malebligi, ke ili mortu aŭ mortigu por la patrioj, se al ili tio plaĉas. Ni petas, ke ili almenaŭ permesu, ke ni ne imitu ilin...

En la lasta n-ro de *Herezulo* tiaj demandoj, kiaj estas la ĉi-supre aluditaj, estas larĝe pritraktataj. Ĉu aprobantoj, ĉu malaprobantoj de l'tezo havas certe grandan intereson en la legado de tiu 28-paĝa kajero. Ĝi estas havebla ĉe la sidejo de *Sennaciista* Frakcio : R. Roberts, 1 Caister Ave., Whitefield, *Manchester* (Britio), ĉe perantoj en kelkaj landoj k ankaŭ ĉe SAT. Prezo : po 2 resp. kuponoj por 1 ekz-o ; po 3 resp. kup. por 2 ekz-oj.

LA KOMUNISTEMA FRAKCIO

sciigas, ke momente la enspezoj restis tute subnivelaj, same kiel la eksterlanda kunlaboro. Ĉar ĝi ne volas ekeldoni « interkontaktikon », antaŭ ol — almenaŭ provizore — ĝia daŭra ekzisto finance estos garantiita, ĝi prokrastis la aperdaton ĝis tiu tempo. Cetere estu certaj, ke interperiode ĝi ne nur estas, sed restas vivanta, kreskanta k laboranta. Lige kun la rezonado de K-do Thorsen en la antaŭa n-o, ni ankoraŭfoje atentigas pri la esenca principo de nia frakcio, kiu ne celas unuigi partiemulojn, sed simpatiantojn al la idearo de la Tria Internacio, do amikoj de Sovetio. Unue ĉar nur tia frakcio rajtas fondi sin, konsidere la nombron de samopiniantoj en la SAT-anaro ; due ĉar veraj esperantistoj neniam povas esti partiemuloj. Sur tiu ĉi bazo ni volas konstrui, el tia vidpunkto ni volas konsideri k tia lumo radios nian per tia

pensaĵo difinitan vojon. Tial ni direktas hodiaŭ

Avizon al la tuta klaskonscia esp-istaro,

rilate Hispanion. Ni devas kalkuli pri eventualaj tre gravaj efikoj, unue rilate Francion, eble poste rilate aliajn landojn. Eble la civilmilito en Hispanio estas prologo al la klasa finlukto. Tial ni emfaze konsilas fari ĉion, kio povas unuigi, eviti ĉion, kio povus disigi la proletaron.

Koncerne al la ĉiaforma subteno rilate Hispanion, mi atentigas pri « Popola Fronto », nova eldono de Valenciaj Gek-doj, belaspekta k bonenhava. Kiuj jam favoras hisp. gazeton, ili kompreneble daŭrigu la subtenon, ne ŝanĝu. Sed al aliaj ni nepre rekomendas la menciitan presaĵon, kiu estas tre leginda. La adreso estas: K-do *Ant. Pont,* Plaza Republika, n-o. 2, *Valencia.* Ankaŭ relegu nian alvokon en la aŭg. n-o. Kaj kiam tiam ankoraŭ io mankas al vi, ne forgesu nian frakci-adreson: K-do *Jovado,* Hoofdweg 103-11, *Amsterdamo.*

LA KVINDEKA...

Aperis en kvindek numeroj de « S-ulo » listoj kvitancantaj monsumojn donacitajn por « ŝtopi la Breĉon »; en kvindeko el la numeroj aperintaj post la monperdo el la jaroj 1930-31 k la varperdo en 1933 (Lajpcig). Kvindekfoje la legantoj povis konstati la fervoron k la oferemon de K-doj, pretaj re-solidigi la fundamenton materialan de la Asocio. Multaj ŝtormoj trablovis la domon, skuis la tegmenton. La konstruistoj ne ŝanceliĝis; ili riparis la domaĝojn; ili alportis brikon post briko. La sumo kolektita nur depost nia alvoko en julio de tiu ĉi jaro (do de la 46. ĝis la 50. listo inkluzive) ciferiĝas je proks. 4115 fr. frankoj. La granda deficita kolono komencas senti la premon, la atakon de l'ŝtormuloj. « Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan », kantis Zamenhof en sia glora poemo. Ankaŭ la deficita kolono de SAT disrompiĝos baldaŭ komplete sub la konstanta martelado. Nenia dubo! Kaj granda ŝarĝo trenita tra jaroj da mallumo, falos de nia dorso, k la venontjaraj bilancoj anoncos sanon k prosperon.

50. LISTO

SAT-ano 55	fr. fr.	300.—
Glodo	»	10.75
Erbaro	»	10.—
L.	£	1.—
Lab. Esp. Grupo, Merksem	fr. fr.	10.—
Gek-doj Dumont, Montreuil	»	10.—
Chiland, Paris	»	5.—
Amala SAT-Rondo	sv. kr.	7.—
Avila, Angra	fr. fr.	10.—

EN ALĜERIO

En Alĝero, la ĉefurbo de Alĝerio, naskiĝis sendependa « Paca Rondo » (adreso: 4, strato Négrier, Alger), fondita de la « Amikoj de la Homara Patrio », celanta nur pacan aferon, rendevuejo de ĉiuj sinceraj pacistoj. La Rondo aranĝas senpagajn elementajn k perfektigajn esp.-kursojn. Alĝeriaj K-doj vizitu la ejon.

La vero estas severa kunulo. Ĝi estas provizita per feraj dornoj: ĝi vundas tiun, kiu ĝin atakas k kelkfoje ankaŭ, kiu ĝin diras. A. DUMAS.

Ekster nia movado

La esp.-movado en Japanio

Venontjare la japanaj esp-istoj havos sian 25-an kongreson (nome de 20.-23. novembro 1937). Kun ĝi ili festos la 50-an jubileon de la lingvo k komencos la propagandon por Universala Ekspozicio, kiu okazos en Tokio en 1940, samjare kun la XII-a Olimpiado. En ambaŭ aranĝoj esperanto ludos, laŭ la intencoj de la japanaj esp-istoj, gravan rolon. Cetere en tiu sama jaro la japanoj memorsolenos la 2600-an jaron de la starigo de sia ŝtato. La tieaj esp-istoj ŝatus, se la universala esp. kongreso okazus en 1940 en Tokio. (Estas ja utile k montras bonan fervoron, ke la jap. esp-istoj klopodas jam nun pri tiel malproksima okazontaĵo; ni pensas tamen, ke dum 4 jaroj multo povos okazi k ke oni ne kalkulu tro firme je plenumo de programo hodiaŭ akceptata por post kvar jaroj; eble en 1940 Eŭropo kuŝos en cindro k ruinoj...)

La direkcio por turismo de l'Fervoja ministerio eldonis duan fojon gvidlibron « Japanio » (20.000 ekz-ojn). Ankaŭ la sud-manĉuria fervoja kompanio eldonis gvidilon kun esp. teksto k preparas novan, pli ampleksan broŝuron samcelan. (Oni petu senpage k poste skribu sian opinion pri ĝi al: Sud-Manĉuria Fervoja Kompanio, *Dairen,* Japanio).

RECENZEJO

Duope ricevitajn librojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

FRATECO EN LA VIVPRAKTIKO de *Henrieta Roland-Holst v.d.Ŝalk.* Tradukis el la nederlanda K-dino *H. Buis.* 28 paĝoj. Form. 11 × 14 cm. Prezo: 1.50 fr. fr. afrankite.

Legantoj de « Senn. Revuo » memoros pri tiu interesa socia studo, kiu aperis siatempe sur la paĝoj de « S. R. », k kiun SAT nun eldonis en formo de plaĉaspekta broŝuro. La enhavo estas vere pripensiga; ĝi montras la malfortojn de l'homa karaktero k la lukton inter la egoista instinkto k la volo al kolektiva kunvivado k respekto al la aliaj homoj. K-dino Roland-Holst, konata revoluciema aŭtorino, estas optimisma rilate la evoluon de l'homa speco, kvankam ŝi klare elmontras la danĝerojn minacantajn la homaron. Lingvo k stilo de l'libreto estas klaraj k simplaj. Ni varme rekomendas la legaĵon al ĉiuj fratecon aspirantaj homoj.

EMBA: MARIA K LA GRUPO. Originala romano. Eld. Literatura Mondo, Budapest. AELA-serio 1935. Form. 13,5 × 20. Kun kolora kovrilo, 172 pĝ. Prezo: broŝ. 0.70 dol., bind. 0.95 dol.; luksa eldono: 1.30 dol., plus 10 % por sendo. Havebla ĉe SAT *(broŝ.)* por 15 fr. fr. + 1.20 por afranko.

Detala recenzo pri la libro de nia K-do aperos en « Senn. Revuo ».

P. TH. JUSTESEN: RAFFLESIA ARNOLDI. Bildo kun teksto. Eldonita en Kopenhago. Adr. ĉe la aŭtoro, *Fannerup per Kolind* (Danio). Prezo: du resp. kuponoj. Form. 21 × 27 cm. Kvin fotobildoj k unu tekstpaĝo grandformata pri giganta parazitfloro kreskanta en la arbaroj de Sumatro k Borneo.

100 PIKANTAJ PANŜMIRAĴOJ, kolektitaj de dr. *M. Topolansky,* kompletigitaj k eldonitaj de kuirejestro *Franz Ruhm.* Elgermanigis *Dr. H. Sirk,* lektoro de esp-o. 42 paĝoj. Form. 11 × 15 cm. Prezo nemontrita. Eld. Ruhmverlag, Museumstr. 3, *Wien VII.* Prezo: 1.20 aŭ ŝil.

OSLO. Konkursa numero (n. 40). La koncerna n-o de « Oslo dum tiu ĉi semajno » enhavas 3 artikolojn trafik- k art-propagandajn en esp-o kun belaj ilustraĵoj. Tradukantoj en nacilingvon povas partopreni konkurson ĝis la 31. 1. 37. Peti detalojn al « Reisetrafikforeningen, Egertorvet, Oslo ».

LJUBLJANA. Ilustrita plurkolora faldprospekto pri tiu jugoslava urbo. Havebla ĉe la Esperanto-Klubo en Ljubljana (Delavska Zbornica).

MEMORNOTO

REPRESIS EL « S-ULO »: *Arbetaren,* Stokh., 29.10.

PRIESPER. ARTIK. K NOTOJN ENHAVIS: *Signalen,* Stokh., 8., 15., 22., 29.10., 5.11; *Wapens* Neder, Dordrecht, sept.; *Le Combat Syndicaliste,* Paris, 16.10.; *La Voix Libertaire,* Limoges, 24.10., 7.11.; *La Femme Socialiste,* Paris, okt.; *El Mercantil Valenciano,* Valencia, 1.11.

PRI LA KONGRESO ENPRESIS: *The Plebs,* London, okt.

Korespondado

Simpla trilinia anonceto kostas 4.50 fr. fr.

ĈEĤOSLOVAKIO

Kiu sendos al mi PM sialandajn aŭ de div. landoj, ricevos de mi aerpoŝte samvalorajn PM de Ĉeĥ. Resp. ĉiam. Adr.: *Josef Wuchterl, Holeischen* 127 apud Pilsen.

NEDERLANDO

La sekcio Harlemo III-a (grupo de fervojistaj esp-istoj) dez. korespondadon komunan k individuan kun ĉiulandanoj. Nepre respondos. Sekretariejo: *K. J. Muntjewerff,* Weteringstr. 43, *Haarlem.*

Gek-doj ĉiulandaj! skribu! Mi dez. kor. por grupo. Certa resp. Skribu grandnombre al: K-do *C. Teuling,* v. Heusdestr. 43 a, *Rotterdam-W.*

FRANCIO

Juna advokato dez. kor. kun Gek-doj en la tuta mondo pri P.M. interŝ., PI, pol. soc., internacia juro. Nepra resp. *R. Gay,* 110, rue de Fontenay, *Montreuil* (Seine).

SVEDIO

Juna sveda laboristo dez. kor. kun Gek-doj ĉiulandaj per PK, L. Adreso: *Erik Karlsson,* Hesselkullen, *Fornasa.*

Radio-Programo

Barcelono (CNT-FAI), ondo 42,88 m. (ŝanĝo!), esp. dissendoj *merkrede* k *sabate* (je la 23-a h., hisp. tempo).

Valencio, esp. dissendoj -kompartia stacio, marde k vendrede je 17-a h. (hisp. tempo), ondo 41,87 m.; — soc.-partia stacio, lunde k sabate je la 12-a h. (hisp. t.), ondo 41 m.

Hilversum (VARA), F.L.E. — nov. 28, La Espero k dialogo: 12.12., elsendo por k de infanoj; 26.12. esp. kantoj (en 1937 okazos ondoŝanĝo). Horo: proks. 17-a MET, daŭro: 20 minutoj.

LINGVA-KOMITATO-AKADEMIO. — Sekretario: *R. de Lajarte,* 4, Villa d'Orléans, *Fontenay-sous-Bois* (Seine), Francio. La LK-anoj voĉdonis pri *ŝanĝo en la Regularo* koncerne la konsiston k elekton de la L. K. Respondis 53 membroj el 116. La respondintoj aprobis, ke la nombro de LK-anoj ne devos superi 100, k ke tiu nombro estu atingata antaŭ 1940, per neplenumado nur de la postenoj vakantaj pro morto aŭ eksiĝo. 45 aprobis, ke estu intertempo da unu jarduono inter prezentado k baloto de novaj membroj.

LA AMSTERDAMA DISTRIKTO FLE VARBIS EDO FIMMEN, *ĝen. sekr. de la Internacia Transportlaborista Federacio.* — Kiel kutime ankaŭ ĉi-jare la distrikto aranĝos Zamenhofvesperon. Ni sukcesis persvadi Edo Fimmen paroladi la 15an de decembro pri la internaciaj rilatoj de la lab. movado. Sendube li por tio estas kapabla persono pro sia sekretaria laboro en organizo kun rilatoj en dekoj da landoj. La sekcioj en Amsterd. jam ricevis la biletojn; la membroj rapidu aĉeti. K-doj eksterurbaj estas bonvenaj, ili petu programojn al F. ten Hagen, Crynsenstr. 51. *Amsterdam W.* Prezo: 30 cendoj. Anoncu al la estraro viajn eksterfeder. kursojn plej baldaŭ!